Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 24an de majo 2012, per Skype.

(Protokolo aprobita la 28an de junio 2012.)

Partoprenis:

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Anne Karin Bondhus en Bryne
Ulf Chr. Lunde en Os en Hordaland
Mario Machlik en Tromsø

0. Tagordo

Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 27an de aprilo 2012

La protokolo ne pretis.

2. Ekonomio

a) La kasisto raportis pri la ekonomio.
   Skagen vekst: 31 533 kr
   Skagen høyrente: 61 218 kr
b) En 2008 NEL ofertis al la Oslo-klubo, ke tiu ricevu 60% de ĉiuj luig-enspezoj de Esperantonia, dum la Ligo ricevu 40%, ĉar la Oslo-klubo faras la praktikajn aranĝojn pri luigado. Ni decidis en la hodiaŭa estrara interkonsiliĝo, ke tiu aranĝo validu ĝis ni eventuale decidos ion alian.

3. Jarkalkulo 2011

La jarkalkulo estas preskaŭ preta.

4. Jarraporto 2011

Ni laboris pri la jarraporto.

5. Eventualaĵoj

a) Hilde Dahlberg kaj Marianne Lund faris norvegan tradukon de la 12-paĝa broŝuro «Oppdag esperanto». Laboras pri ĝi ankaŭ Mario Machlik kaj Douglas Draper. Ĝi baldaŭ estos havebla kiel pdf-dosiero.
b) Ni planas sendi aldonajn studplanojn por kursoj por komencantoj al la studasocio. Anne Karin jam laboras pri la afero.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30–21:15.
La venonta interkonsiliĝo okazos la 21an de junio 2012.
Raportis Jardar Eggesbø Abrahamsen.